

La Progresanto

REDACTIE-
COMITÉ

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 2.- per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331183

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

MALLONGIGOJ EN ESPERANTO

G. P. de Bruin

La vortoj de lingvo estas uzataj ne ĉiam en sia plena formo. La leĝo de minimuma peno efikas ankaŭ ĉi tie kaj kondukas al mallongigo de vortoj kaj esprimoj. Tiel estiĝas la tiel nomataj mallongigoj.

Ankaŭ Esperanto havas siajn mallongigojn. Ili estas diversspecaj kaj dividiĝas laŭ jenaj kategorioj:

1. Tiuj, ĉe kiuj oni forlasas la dekstran parton de la vorto, konservante kelkajn sinsekvajn komencajn literojn: *prof.*, *ing.*, *lab.*, *int.*, *proks.* kaj similaj.
2. Tiuj, ĉe kiuj oni konservas nur la komenca(j)n litero(j)n de vorto aŭ esprimo: *k.t.p.*, *t.n.*, *i.a.*, *k.c.* kaj similaj.
3. Tiuj, ĉe kiuj oni uzas nur la komencan literon aŭ krome unu el alia loko de la vorto: *p.* (paĝo), *bv.* (bonvolu), *pk.* (poŝtkarto), *ĉ.* (ĉirkaŭ) kaj similaj.
4. Tiuj, ĉe kiuj oni forlasas la vortparton, kiu estas ripetata en unu aŭ pli da sekvantaj vortoj: *Rus-*, *Franc-* kaj *Germanlando*, *en-* kaj *eliri*, *al-* kaj *reveturo* kaj similaj.
5. Tiuj, ĉe kiuj oni elligas parton de la vorto inter la komenca kaj la fina(j) literoj: *s-ro*, *k-dino*, *n-ro* kaj similaj.
6. Tiuj uzataj por la nomoj de asocioj, institucioj aŭ verkoj, ĉe kiuj oni kuniĝas la komencajn literojn de ĉiu vorto, kiu troviĝas en la tuta nomo: *S.A.T.* aŭ *SAT*, *U.E.A.* aŭ *UEA*, *L.K.K.* (Loka Kongresa Komitato), *P.V.* (Plena Vortaro). Proksimume samspecaj estas la mallongigoj: *E.S.* (Estimata Sinjoro), *K.K.* (Kara Kamarado), *P.S.* (Posta Skribo), *N.B.* (Notu Bone) kaj similaj.
7. Tiuj aplikataj de verkistoj por speciala temo, kiel ekzemple la de E. Wüster uzataj mallongigoj de la titoloj de Zamenhofaj verkoj: *Bat* (La batalo de l'vivo), *Par* (Kongresa Parolado) kaj la mallongigoj de aŭtoraj nomoj, kiel Z. (Zamenhof), *K.* (*Kabe*) kaj similaj.
8. Tiuj, ĉe kiuj oni uzas la komencan parton kaj la finaĵon de la kompleta vorto: *foto* (fotografiaĵo), *kino* (kinematografejo), *aŭto* (aŭtomobilo).

Noto.

Tute aparta speco de mallongigo, se oni rajtas nomi ĝin tia, estas la apostrofado de la finlitero de substantivo kaj artikolo: *dom*, (domo), *ĉiel*, (ĉielo), *de l'espero* (de la espero).

Ĉi tiu tamen servas nur por celoj de mezuro, ritmo kaj stilo kaj do ne estas vera mallongigo, kiaj la aliaj.

Strangajn, nekutimajn (nepermesitajn?) mallongigojn oni trovas ĉe Raymond Schwartz en „La gaja podio”, nome: *'piskopa* (episkopa) kaj *aŭt'mobilo* (aŭtomobilo).

La plimulto el la nomitaj specoj de mallongigoj estas uzataj nur skribe. Ĝenerale nur la nomojn de asocioj kaj institucioj, nomitaj sub 6) kaj tiujn men-

MALĜOJIGA KOMUNIKO

Jam kelkajn semajnojn nia ĉefredaktoro, k-do G. J. Degenkamp, estas grave malsana; transporto al malsanulejo estis necesa. Kvan-
kam komence la kuracistoj opiniis severan ripozon sufiĉa por resaniĝo, tamen operacio montriĝis necesa. Ankoraŭ estas tro frue por paroli pri ĉiurilata sukceso.

Ni kore esperas, ke la postoperacia ripozo efikos sanige.

Ni certe en la nomo de ĉiuj legantoj povas deziri al nia fervora redaktoro BALDAŬAN RESANIĜON!

Provizore funkcias kiel redaktoro k-do H. Kuijt.

La redakta komitato.

ciitajn sub 4) kaj 8) oni uzas ankaŭ parole. Tamen ni foje aŭdis: *ko-to-po*, sed ĉi tiu maniero estas neimitinda. La nomojn de asocioj kaj institucioj oni elparolos ofte kiel unu vorton. Kelkiuj prononcas ĉiun literon aparte: S.A.T. kiel *so-a-to*, K.E.L.I. kiel *ko-e-lo-i*, sed tiu maniero ŝajnas nerekomendinda. Nur se la literoj kune ne formas elparoleblan vorton, kiel L.K.K., S.R. oni prononcas la literojn aparte: *lo-ko-ko*, *so-ro*, aŭ nomas la plenan nomon: Loka Kongresa Komitato, Sennacieca Revuo.

La mallongigoj sub 7) nomitaj estas ne komunuzaj, sed specialaj, fakaj kaj ili do estas uzataj ne ofte; tiuj de la lasta kategorio jam ne plu aspektas kiel mallongigoj kaj estas do uzataj kiel ordinaraj vortoj.

Koncerne la formadon de mallongigoj, laŭ nia scio, ne ekzistas fiksitaj reguloj. Almenaŭ en la praktiko oni ne agas laŭ unueca sistemo. Niaj gramatikistoj kaj vortaristoj ne multe okupis sin pri mallongigoj. Nek „Plena Vortaro“, nek „Plena Gramatiko“, nek aliaj vortaroj aŭ gramatikoj pritraktas ĉi tiun temon. Diversaj el ili enhavas liston da mallongigoj, sed ofte ĉi tiuj rilatas al la temo de la verko mem kaj do ne estas komunuzaj.

Ne trovinte klarigojn koncerne la formadon de mallongigoj en niaj prilingvaj verkoj, ni turnu nin al la praktiko, al la uzado kaj klopodu el la tie trovataj ekzemploj dedukti ian regulon, ian principon. Komparante la diversmanierajn mallongigojn ni povas starigi la jenajn regulojn. Oni mallongigas:

1. Per forigo de la dekstra parto de la vorto, konservante la unuan literon, aŭ la unuan kaj kelkajn sekvantajn. Ĉi tiu regulo estas la ĉefa kaj ĝi koncernas substantivojn, adjektivojn, adverbojn, verbojn, prepoziciojn, pronomojn kaj konjunkciojn.

2. Per forigo de kelkaj literoj, konservante la unuan kaj unu alian el alia loko de la vorto. Ekzemploj: *bv.* (*bonvolu*), *st.* (*sankta*), *ĵc.* (*jarcento*), *pk.* (*poŝtkarto*) kaj similaj.

3. Per forigo de peco de la vorto inter la komenca(j) kaj la fina(j) litero(j). Ĉi tiun regulon oni aplikas ĉefe ĉe titoloj: *s-ro*, *d-ro*, *k-do* kaj ĉe kelkaj alispecaj vortoj: *n-ro* (*numero*), *ekz-o* (*ekzemplero*) kaj similaj.

Estas stranga fakto, ke kelkaj mallongigoj de titoloj, nome tiuj de *profesoro* kaj *ingeniero* ne konformas al la lastnomita regulo. La nomitajn vortojn oni mallongigas per *prof.* kaj *ing.* Kial ne per *p-ro* kaj *i-ro*, laŭ la regulo 3-a? La mallongigoj de la vortoj *prezidanto*, *sekretario*, *kasisto*, kaj *delegito* estas *prez.*, *sekr.*, *kas.*, kaj *del.* . . . Ankaŭ ili prezentas titolon aŭ almenaŭ funkcion kaj por ili do validas la samo, kiel por la du supre nomitaj vortoj. Sed estas evidente, ke mallongigoj kiel *p-ro*, *i-ro*, *p-to*, *s-io*, *k-to*, *d-to* ne trovas aprobon. Ŝajnas, ke la iom stranga aspekto kaj la fakto ke oni ne tiom facile rekonas ilin kiel la mallongigojn, *prof.*, *ing.*, *prez.*, *sekr.* kaj similaj malfavoras ilian akcepton. Estus eble trovi mezan vojon kaj krei novan sistemon: *prof-o*, *ing-o*, *prez-o* k.t.p., sed, ĉar ĉi tiuj estas pli longaj ol la jam popularaj *prof.*, *ing.*, *prez.* kaj similaj, ŝajnas rekomendinde daŭrigi la uzadon de la formoj lastnomitaj. Nur se estos necese montri pluralon aŭ akuzativon, oni aldonu la literon *o*: *ni renkontis prof-on A.* Ĉi tio validas ankaŭ en iu alia okazo: *li lernas Esp-on.*

(Daŭrigota).

POR KOMENCANTOJ

H. Kujt.

In dit nummer geven wij weer een examentaak. In het volgend nummer wordt de behandeling der correlatieven voortgezet. Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

1. Kent U Dr. Zamenhof, de schepper van Esperanto, die het grootste deel van zijn leven gewijd heeft aan deze taal?

2. Hebt U reeds een boek gelezen, wat door hem is vertaald?

3. Laat uw eerste boek een vertaling van Zamenhof zijn.

4. Al lezende, zult U vormen tegenkomen, die min of meer verouderd zijn, maar na enige studie zult U ze zeker begrijpen.

5. Zulke vormen moet U vergelijken met moderner uitdrukkingen, opdat U over de ontwikkeling der taal zult leren.

6. Hoe mooi zijn de sprookjes van Andersen, en zo eenvoudig, maar toch meesterlijk vertaald.

7. Hoe vindt U het sprookje „De nieuwe kleren van de koning”, over die vorst en zijn ministers, die zich zo belachelijk gedroegen?

8. Met hoeveel genoegen zult U het bekende drama „De rovers” van Schiller lezen.

9. Als iedere esperantist enkele werken van Zamenhof goed had gelezen, waren er veel meer bekwame geestverwanten.

10. Er zijn nog veel meer goede vertalingen, de boeken van Kabe en Šidlofskaja bijvoorbeeld.

11. Kabe is de bekendste van de twee.
12. Deze vertaalde een der mooiste boeken, „De Farao”, geschreven door B. Prus.

13. Onder het lezen van dit boek wordt men, of men wil of niet, getroffen door de schoonheid van onze taal.

14. Zulke boeken zijn niet slechts naar inhoud lezenswaardig, maar ook volgens de taal zeer leerzaam.

15. In de laatste tijd begint men meer en meer te begrijpen, dat aandachtig lezen strikt noodzakelijk is om een taal goed te leren.

Vertaling van opgave 7.

En 1) la ekspozicio ni vidis 2) ion belan. Mi komprenas nenion pri 3) tiu ĉi afero. Pri kio ŝi parolis la tutan vesperon? En la lasta tempo 4) mi estas ne tute sana, pro tio 5) mi ne iris al nia kongreso. 6) Vi kredu ne ĉion, kio estas skribita 7) en la letero. Io tia 8) ne povas okazi al mi. Oni parolas ofte pri io, kion oni ŝatas posedi. 9) Tion 10), kion vi al mi diris, mi jam sciis. Li faris nenion por helpi nin, pro tio mi ignoras 11) lin.

1) Niet: *ĉe, sur*; *ĉe* = dichtbij, *sur* = op. 2) Ook *estas vidintaj*; echter niet zonder *j, ni* is immers meervoud. 3) Niet: *de*; de betekenis van het Ned. voorzetsel *als* is in deze zin *betreffende*. 4) Ook: *la lastan tempon*. 5) Ook: *tial*; vaak kan men pro *tio* vervangen door *tial* en andersom. Toch is er wel enig verschil. *Tial* geeft antwoord op de vraag *kial, pro tio* op *pro kio*. Op de laatste valt meer nadruk. 6) Niet: *nian kongreson*; na *al, de, ĝis* en *el* komt geen richtings *n*. Vooral bij *al* is dit duidelijk. Dit voorzetsel geeft immers een richting aan. 7) Ook: *staras*. 8) Niet: *ion tian*; dit zinsdeel is onderwerp. 9) Ook: *volonte deziras posedi, havi*. 10) Niet: *tio*; men heeft hier met twee volzinnen te doen, n.l.: *Tion, . . . , mi jam sciis* en *. . . , kion mi diris al vi, . . . ,* deze moeten ieder apart ontleed worden. 11) Minder juist *neglekti*; met dit woord zegt men niet, dat er van opzet sprake is.

Beoordeling:

A. A. D. te Z. 7; J. H. te A. 9; J. v. H. R. te A. 8; London 9; G. A. te R. 10. E. A. B. te A. 10; C. v. B. te S. 9; Astor 9; Th. B. te A. 10; J. B. te D. 8; J. J. te H. 9; A. J. G. te D. 9; J. G. v. d. P. te U. 5; D. P. te A. 9; J. F. D. te L. 9; J. F. v. D. te A. 9; F. G. te R. 6.

VOOR HET B DIPLOMA:

Tra la labirinto, F. Faulhaber	f 5.90
Gvidilo tra la Esp. movado, G. P. de Bruin	f 0.95
Leidraad bij de studie van de Esperanto literatuur, G. J. Degenkamp	f 0.45

LIBROSERVO F.L.E. — Roelantstraat 4, Amsterdam-West.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem.

Met hangende pootjes.

Hij komt er wel.
Van twee wallen eten.
Wat heb ik je in de weg gelegd?
Het stond bij mij als een paal boven water.

Kleine potjes hebben grote oren.
Niet veel om het lijf hebben.
Er schuilt een addertje onder het gras.

Alles wel beschouwd.
Hij weet waar Abraham de mosterd haalt.

Het niet erg op iemand begrepen hebben.

Het op iemand gemunt hebben.
Met de mantel der liefde bedekken.
Zijn eigen zin doen.

OPGAVE 8.

1. Hij hield een lange redevoering, maar wat hij zeide had niet veel om het lijf. Hij is een handige en vlijtige jongen. Geloof mij, hij komt er wel. Hij weet waar Abraham de mosterd haalt. 3. Ik had het niet erg op hem begrepen. Ik voelde dadelijk, dat er een addertje onder het gras school, daarom was ik voorzichtig en gaf niet veel antwoord. 4. Alles wel beschouwd, hebben wij niet te klagen over de ijver en het gedrag van uw zoon. Als hij voortgaat zijn best te doen, zal hij zeker één der besten van de klas worden. 5. Schei nu (eens) uit. Je hebt het altijd op mij gemunt. Wat heb ik je in de weg gelegd? Laat mij met rust en bemoei je met je eigen zaken. 6. Hoewel je het niet verdient, zal ik alles graag met de mantel der liefde bedekken, maar doe mij het genoegen voortaan het gezelschap te mijden van lieden, die trachten van twee wallen te eten. 7. Je moet niet alles zeggen in het bijzijn van kinderen. Kleine potjes hebben grote oren. 8. Hoewel ik hem dringend gewarschuid had, deed hij toch zijn eigen zin. Dat hij na enige tijd met hangende pootjes bij mij terug zou komen, stond bij mij als een paal boven water.

VERTALING VAN OPGAVE 7.

1. Post mallonga interdiskuto mi prosperis konvinki lin pri la utilo de Esperanto kaj nuntempe li estas unu el niaj plej fervoraj propagandistoj.
2. Ĉe la rando de la arbaro la aleo

Kiel hundo kun la vosto inter la kruroj.

Ĝim post iom li atingos la celon.

Mangi el du raŭfoj.

Per kio mi ĝenis vin?

Pri tio mi estis absolute certa.

Etuloj aŭdas eĉ tra la muroj.

Esti preskaŭ sensignifa.

Sin kaŝas vipero en la herbo.

Se ni ĉion konsideras.

Li scias la vorton de la literaseruro.

Suspekti iun.

Ĉikani iun.

Kaŝi per mantelo de kompatemo.

Agi laŭ propa plaĉo.

diviĝis en du vojojn. Pro tio, ke ni ne konis la tiean situacion, ni trafe maltrafe elektis la brikvavimitan vojon.

3. Kiam vi bonfartis, vi ĉiam diris:

„Ĉiu zorgu pri si mem”. Ĉu vi nun

mem estante (troviĝante) en embara-

raso, miras ke neniu sin interesas

pri vi? Kia ago, tia pago! 4. Vi ne kaŝ-

ludu. Se vi eraris, honeste konfesu

tion. Pli bone estas reiri ol perdi la

vojon. 5. Estas elbarite, ke ni povas

konfidi al li tiun taskon. Mankas al li

kapablo kaj takto, ecoj nepre necesaj

por atingi nian celon. 6. Estis belega

tago. La kato sunĝuis sur la fenestra

breto, la birdoj aŭdigis sian ĉarman

kantadon kaj la vento transportis al

ni la odorojn de la floroj. Ĉio spiris

pacon kaj feliĉon. 7. Solene mi certi-

gas al vi, ke mi neniam entreprenos

ion, kio povus al vi malutili, ke mi

estas preta abnegacie plenumi ĉiujn

viajn dezirojn.

Bonvolu korekti: Opgave 6. 8a frazo:

Het is prachtig weer, d.e. Het was

prachtig weer.

Beoordeling: Astor 9; E. A. B. en A. 9;

J. J. B. en D. 7; J. F. v. D. en A. 9;

A. J. G. en D. 8; J. A. V. en U. 6; D.

P. en A. 8; J. A. en O. 9; Tilio 6; G. A.

en R. 8; J. G. v. d. P. 7; J. v. H.-R. 3;

J. H. en A. 8; T. B. en A. 7; J. F. D. en

L. 9;

POST LEGADO ne tuj formetu ĉi tiun numeron en vian ŝrankon. Vidigu ĝin al viaj Esperanto-amikoj; parolu pri la enhavo kaj VARBU NOVAN ABONANTON!!!

KIO OKAZIS EN 1949!

G. P. DE BRUIN

(Daŭrigo)

„Federacio de Islandaj Esperantistoj” (153 membroj) kuraĝe eldonis dum 1949a kvaronjaran, grandformatan, ilustritan gazeton „Voĉo de Islando” por diskonigi la islandaj vivon kaj popolon. Espereble la subteno de alilandanoj ebligis la pluaperadon. Sondo de la opinio de la islanda popolo koncerne Esperanton montris, ke 72,5% favoras nian lingvon; 17,1% kontraŭas ĝin kaj 10,4% estas indiferenta pri ĝi.

En Japanio la movado progresas malgraŭ malfavora ekonomia situacio. La 36an kongreson de japanaj esperantistoj ĉeestis proks. 130 personoj. Pluraj fakkunsidoj. Propaganda parolado de Goro Hani, parlamentano kaj fama verkisto. En sciencaj rondoj multe da interesiĝo. T. Kirisu publikigis en du verkoj, „Voĉo de l mondo” kaj „La sama suno brilas super la tuta mondo”, leterojn el eksterlando en japana traduko.

Pri la movado en Nederlando ni intencas aperigi aparten kelkjaran kronikon. „Norvega Esperantista Ligo” bonvolis sendi raporton pri 1948a, el kiu ni ĉerpas, ke ĝia membronombro estis 532. Raporto pri 1949a ankoraŭ ne alvenis. „Polo Esperantisto” aperas ciklostilita. Ni ricevis unu numeron preskaŭ tute pollingvan, do ne povas raporti.

En Portugalio oni malpermesis la propagandon kaj instruadon de nia lingvo. Oni traserĉis le ejon de „Portugala Esperanto-Ligo”, konfiskis ĝiajn posedaĵojn kaj oficiale likvidis ĝin. Korespondante kun Portugalio oni skribu nur letere kaj uzu kovertojn sen Esperanta teksto. Orient-eŭropanoj tute ne skribu.

„Sveda Esperanto-Federacio” aranĝis en la daŭro de sia aŭtuna propagando prelegan vojaĝon de la egipta samideano Tadros Megalli. Okazis pli ol 150 prelegoj en 50 diversaj lokoj. Poste (februaro-majo 1950a) ankoraŭ 60. Entute pli ol 20.000 personoj aŭskultis la paroladojn. Oni vendis 2000 lernolibrojn kaj 5000 ŝlosilojn. Pli ol 800, svedaj gazetoj publikigis artikol(et)ojn. Oni aperigis por disdonado, du inform- kaj propagandbroŝuretojn kun eldonnumero po 25.000 ekzempleroj. La sveda registaro donis subvencion al „Sveda Esperanto-Instituto” de 1080 sv. kr. por sendi delegiton al la kongreso en Bournemouth. Aperis ĉiumonate „Svenska Esperanto-Tidningen”, eble la plej ampleksa kaj plej bonaspekta nacia Esperanto-organo. „Sveda Laborista Esperanto-Asocio” nombris supozeble proksimume 700 membrojn.

„Svisa Esperanto-Societo” malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj (Ido- kaj Occidental-movadoj havas tie sian centron) laŭpove agadis. 300 membroj. „Svisa Espero”, ciklostilita kun presita kovrilo, aperis 8foje en la jaro.

En Urugvajo serioza revuo „Anales de Instruccion Primarie” enpresigis multpaĝan artikolon pri Esperanto. Ĝi estis eldonata kiel aparta broŝuro 40 paĝa sub la titolo „Valor Educativo del Esperanto” (Eduka valoro de Esperanto). La 5a kunveno de „Urugvajia Federacio de la Instruistaro” akceptis rezolucion favoran al Esperanto, en kiu oni akcentis la edukan valoron de nia lingvo kaj ĝian signifon por la interkomprenado kaj unuigo de la popoloj.

„Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko” (E.A.N.A.) reaperigis sian dumonatan „Amerika Esperantisto”. Ĝi eliris dumonate, 30 paĝa kaj estas unu el la plej belaspektaj naciaj Esperanto-gazetoj. Propagandbroŝureto 16 paĝa, eldonita de neesperantista „Nacia Eduka Asocio de Usono” aperis en 20.000 ekzempleroj. „Esperanto, the World Interlanguage”, 250 paĝa verko, pritraktanta la bezonon pri internacia lingvo, ĝian historion, la Esperanto-movadon, kaj enhavanta krome lernolibron, legolibron, vortaron Esp.-Angla kaj Angla-Esp., aperis en dua eldono. El la usona parlamenta protokolo dufoje aperis mencio pri Esperanto; en „Encyclopedia Americana” kaj „The New International Year Book” detala artikolo pri Esperanto. Grava filantropa fondaĵo monsubtenis la Esperantan laboron de E.A.N.A. Membraro ĉ. 700.

Finante nian kronikon ni konfesas, ke ĝi estas mankhava kaj nesufiĉa. Ĝi povus esti pli bona, se ni ricevus pli da informoj. Tial ni petas al ĉiuj asocioj

DE WERKWOORDEN

DE WENSENDE WIJS

1. Benaming.

U vindt de titel ongewoon? Wij hebben hem zo gesteld, omdat er geen betere voor te vinden is. We kennen allen de gebiedende wijs (*imperativo*); we weten wat een aanvoegende wijs (*konjunktivo*) is; maar omdat beide in Esperanto door een enkele vorm worden uitgedrukt (*volitivo*), is het wenselijk, dat we er ook een gemeenschappelijke naam voor hebben in het Nederlands. Meestal spreekt men van de *u-modo*, maar iedereen begrijpt, dat dat geen naam is. Wat dan? Wat onder de gebiedende wijs valt, is de uiting van een wil of wens. Wat onder de aanvoegende wijs valt, kan een opwekking of aansporing zijn, maar is meestal eveneens een wens. Waarom zouden wij beide tezamen dan niet *wensende*

wijs noemen? Overigens, wij geven die benaming graag voor een betere.

2. Onderscheid en overeenkomst.

In het Nederlands bestaat een duidelijk verschil tussen gebiedende en aanvoegende wijs. Dit is de oorzaak, waardoor velen zich wel eens afvragen, waarom Zamenhof deze beide wijzen in één enkele verenigt heeft. Als we de zaak echter in bijzonderheden beschouwen, blijkt, dat hij zeer juist heeft gehandeld door hiervoor geen twee onderscheidene vormen te geven.

Onze gebiedende wijs, zelfs in zijn zachtste vorm als *bonvolu respondi*, is voor ons, Nederlanders, altijd duidelijk. De aanvoegende wijs echter niet. Dat blijkt uit de vele fouten, die zelfs ervaren esperantisten in het gebluik van deze wijs maken. Hoe kan dat? De oorzaak is deze: een gebod wordt in onze taal als

regule sendi al ni sian organon, raportojn kaj aliajn informojn. Krome ni petas sendi al ni kritikojn, rimarkojn k.t.p.

G. P. de Bruin, Dokumenta Servo de
„Nederlanda Centra Komitato Esperantista” (N.C.K.E.),
Preangerstraat 35, Enschede, Nederlando.

ALDONO.

Dank' al la bonvolo de U.E.A. ni povas preni el ĝia Jarlibro 1950a la membronombrojn de diverslandaj asocioj. Ili sekvas ĉi sube, kaj ni aldonas la nombrojn de la laboristaj asocioj.

Aŭstria Esperantista Federacio	1200
Reĝa Belga Ligo Esperantista	205
Flandra Ligo Esperantista	398
Brazila Esperanto-Ligo	495
Brita Esperantista Asocio	2300
S.A.T. en Britio	200
Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko	3673
Centra Dana Esperantista Ligo	1294
Dana Laborista Esperanto-Asocio	300
Unuiĝo Esperantista Franca	1800
S.A.T.-Amikaro	630
Germana Esperanto-Asocio	4638
Helena Esperanto-Asocio (Grekio)	85
Hispana Esperanto-Federacio	198
Federacio de Islandaj Esperantistoj	153
Esperantista Ligo Izraela	100
Italia Esperanto-Federacio	298
Asocio de Laborista Esperantistoj	2539
Nederlanda Esperantista Societo	1050
Nederlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj	450?
Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj	250?
Norvega Esperantista Ligo	532
Asocio de Esperantistoj en Pollando	1020
Slovaka Esperanto-Ligo	353
Sveda Esperanto-Federacio	1650
Sveda Laborista Esperantista Asocio	700?
Svisa Esperanto-Societo	300
Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko	728

regel door een gebiedende wijs uitgedrukt (stam van werkwoord voor enkelvoud; stam plus *t* voor meervoud); in enkele gevallen gebruiken we hiervoor een andere vorm, maar hierover later. De aanvoegende wijs evenwel is voor ons geen duidelijk omlind begrip. Wel hebben we in het Nederlands een aanvoegende wijs, maar die wordt slechts zelden toegepast, in enkele vaste uitdrukkingen (*hij leve lang!*) of in z.g. kathedertaal (*het moge u vergund zijn*). Het begrip aanvoegende wijs is echter veel ruimer dan de Nederlandse vorm. Dit begrip wordt in het Nederlands in de regel, en in de spreektaal steeds, weergegeven door een tegenwoordige, een verleden of een verleden-toekomende tijd (*ik wil, dat hij komt; hij wenst, dat het zal gebeuren; hij wenste, dat het zou gebeuren*). Door die verscheidenheid van vorm wordt voor ons de betekenis van de aanvoegende wijs vervaagd, en wij zijn geneigd ook in Esperanto de wijze of tijd te gebruiken die in de Nederlandse zin voorkomt.

Wat is nu de overeenkomst van de beide wijzen? De gebiedende wijs komt alleen in een hoofdzin voor! de aanvoegende wijs in hoofd- of bijzin. Als we nu de hoofdzin met een gebiedende wijs eens even als een bijzin gaan beschouwen en aannemen, dat de hoofdzin er van verzwegen is, dan zien we, ten eerste, dat die verzwegen hoofdzin dezelfde kan zijn als de hoofdzin voor een aanvoegende

wijs; en ten tweede, dat de gebiedende wijs eigenlijk niets anders is dan een directe rede, waarvan de aanvoegende wijs de indirecte is. Een enkel voorbeeld zal dit verduidelijken:

Skribu (geb. wijs).

Si petis (verzwegen hoofdzin).

Si petis: skribu (volledige zin met directe rede).

Si petis, ke li skribu (volledige zin met indirecte rede of aanvoeg. wijs).

De directe vorm is dus: *si petis: skribu*; de indirecte: *si petis, ke li skribu*. Men ziet: precies hetzelfde verschil als tussen de directe en indirecte rede in andere zinnen, b.v.: *mi respondis: mi venos* en: *mi respondis, ke ni venos*.

Als die overeenkomst begrepen is, zal het ons veel gemakkelijker vallen zinnen met een aanvoegende betekenis te onderscheiden van zinnen, waarin die betekenis niet is vervat, trots het Nederlandse gebruik van verschillende tijden i.pl.v. de aanvoegende wijs.

3. Veelheid van vormen.

Toch zijn alle moeilijkheden met het bovenstaande nog niet opgelost. Dat komt, doordat we gewoon zijn te spreken van gebiedende en aanvoegende wijs, terwijl er in werkelijkheid nog meer wijzen zijn, die in de z.g. u-mode zijn ondergebracht. Deze wijzen worden in sommige talen, Latijn b.v., in bepaalde vormen uitgedrukt.

(daurigota)

Demando: Mi legis, ke oni proponis anstataŭi la vorton *alia* per *aliia*. Kian utilon tio alportus?

Respondo: Tio estas erara interpreto de fakto. Neniam oni proponis anstataŭi (ne: anstataŭi) la vorton *alia* per *aliia*. Vero estas, ke s-ro Sentis iam proponis enkonduki novan serion da korelativoj (*alia aliu, alies, aliel* k.t.p.) Tio implicis, ke la signifo de la nuna vorto *alie* fariĝus *alialoke* anstataŭ *aliamaniere*.

Ĉar enkonduko de tiu vortserio do signifas ŝanĝon de la Fundamento, uzo de *alies, aliu, aliel* k.t.p. estas nepermesita. Pro tio ni iam rekomendis uzi laŭbezone *aliies, aliie* k.s., ĉe kies elparolo oni preskaŭ ne aŭdas la duoblan *ii*. Sed estus sensece kredi, ke nia rekomendo celas uzi analogie ankaŭ *aliie* anstataŭ *alia*!

Se ne plaĉas la vortoj kun *ii*, oni skribu: *aliamaniere, aliatempe* k.s. Sed kontraŭfundamentaj estas *alies, aliam* k.c.

NE PLU PROKRASTU. Celu diplomon, la kronon de via studado. Aliĝu al la skriba A KURSO. Daŭro: 8 monatoj. Prezo: f 9.—

PROGRESANTOJ, studu literaturon kaj gramatikon sub gvidado de la skriba

B KURSO. Daŭro: 12 monatoj. Prezo: f 12.—

PROPAGANDU la skriban

ELEMENTAN KURSON. Daŭro: 30 se majnoj. Prezo: f 13.50.

LA KURSOJ KOMENCIĜOS EN OKTOBRO.

Petu informojn al:

INSTRUA SERVO F.L.E.

Roelantstraat 4
Amsterdam-W.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

OPGAVE 9. Vertaal in Esperanto.

Het eerste levenslicht in onze vriendelijke wereld aanschouwde ik op een zolderkamer in de „Jordaan” en mijn wieg was een vierkante wasmand. Het begin was dus niet zeer aantrekkelijk, maar ooggetuigen beweren, dat ik mij daar weinig van aantrok en dat ik in mijn wasmand even vrolijk en lustig kraaide, als een koningskind in zijn wieg van goud.

Mijn moeder, een verlaten vrouw, die voor mij en drie andere kinderen het brood moest verdienen en dus vanzelf veel buitenshuis was, moest mij, toen ik ouder geworden was, veelal aan de zorg van mijn beide stiefbroers overlaten, een paar volmaakte deugnieten, die mij op al hun expedities medenamen.

Gingen zij schuitje varen in een mestpraam, dan zetten ze mij midden in de geurende paardenmest, om te voorkomen, dat ik in het water viel en waren zij op het oorlogspad tegen jongens uit een andere straat, dan bonden zij mij ergens aan een hek of een paal vast.

„De weg der Misdaad” door N95.

Vertaling van opgave 7.

GRENKAMPOJ.

Eĉ se oni fordonis 1) sian koron al la „Vera” la nekulturita 2) naturo, restas tamen 3) nekontestible 4), ke povas eliri ankaŭ miriga 5) ĉarmo el la

kamparo 6), kie komence 7) de julio 8) la grenoj 9) svingetas, muĝetas kaj susuras. Ĝi estas riĉa, delikata kaj eĉ impresa aspekto la milionnombra armeo el fortikaj 10) kaj tamen flekseblaj sekaltigoj 11) pezaj pro la bonpleniĝintaj 12) spikoj, kiel ili 13) verdegriĝas 14) luliĝas sub la blua ĉielvolbo kaj laŭ la progreso de julio, iĝas pli kaj pli blondaj, ĝis kiam la akrega falĉileto fine faligas ilin, samtempe kun la kolorplena herbaĉo 15) de la kamparo: la ĉielbluaj cejanoj kaj la helruĝaj papavoj.

RINKKE TOLMAN.

1.) Een woordelijke vertaling is welhaast onmogelijk. Hier moet men dus de betekenis weergeven. De gehele tekst telt slechts twee zinnen. Kortere zinnen had de duidelijkheid ten goede gekomen.

2) Ook: *kruda*. 3) Ook: *dume, intertempe*. 4) Ook: *neneigeble, nemalkonfeseble*. 5) Ook: *admirinda*. 6) Ook: *kampoj*. 7) Ook: *en la komenco*. 8) Niet met een hoofdletter. 9. Ook: *ce-realoj*. 10) Niet: *kurajaĵ*. 11) Ook: *trunketoj*. 12) *La spikoj iĝas plenaj*; dus beter dan: *plenigitaj*. 13) Ook: *tiuĵ*. 14) Bepaling van gesteldheid. Vandaar de bijvoeglijke vorm. 15) Hoewel „onkruid” niet altijd *herbo* behoort te zijn, heeft het woord *herbaĉo* burgerrecht verkregen in „Esperantio”.

Beoordeling in het volgend nummer.

NEOLOGISMOJ

mustenjo — sovaĝiĝinta ĉevalo en amerikaj stepoj (moestang)

Nirvano — laŭ budhisma koncepto: beata liberiĝo el la surtera vivo

ogro — fantazia monstro el fabeloj

pimpo — viro vivanta pere de malĉastulinaj (souteneur)

pirueti — turniĝi kiel dancisto (pirouetteren)

plap — onomatopeo esprimanta sonon de falanta objekto pakita en papero

pneŭmonio — inĝlamo de pulmoj (longontsteking)

poĝromo — registare instigita aŭ aprobita mortigado kaj elrabado de judoj (poĝrom)

pompadura — hararangĝo laŭ markizino Pompadour

pu — interjekcio esprimanta malĝaton

puf — interjekcio esprimanta malsaton kontraŭ vanteco

salamio — kolbaso el azenaĵo

sandviĉo — buterita pantranĉo kun viando (sandwich)

ŝlivovico — pruna vino (el la juda lingvo)

taloso — preĝoŝalo (el la hebrea lingvo)

vakero — viro, kiu surĉevalo gardas brutaron en granda brutbieno

viŝnjako — ĉeriza brando (el la juda lingvo)

vodko — rusa brando, distilita el sekalo (wodka)

„LA PERFIDO”, A. M. de Jong

amento — inĝloresko de kelkaj arboj: saliko, poplo, betulo k.t.p. (katje)

drupso — acida sukeraĵo (zuurtje)

flokso — ĝardenfloro el la familio polemoniacoj (Phlox, herfstsering)

jelpi — plende bojadi (janken)

jubili — ĝoje, entuziasme krei (jubelen) (daŭrigota)

